

Ostwald Wilhelm 1910. *Die Forderung des Tages*, Leipzig: Akademische Verlagsgesellschaft.

Ciita far: Henry Jacob. 1943. *Otto Jespersen. His work for an International Auxiliary Language*. Essex: International Language (Ido) Society of Great Britain, 30.

Pataki Pál 2000. Opening address. En: *World Conference on Science. Science for the Twenty-first Century. A New Commitment*. Paris: UNESCO, 22-23.

Phillipson Robert 2004. *Ĉu nur-angla Europo? Defio al lingva politiko*. Rotterdam: UEA (angla orig. 2003).

Privat Edmond 1927. *Historio de la lingvo Esperanto*. [dua parto: La Movado 1900 - 1927]. Leipzig: Ferdinand Hirt & Sohn.

Ramón y Cajal Santiago 1897. Fundamentos racionales y condiciones técnicas de la investigación biológica. En: *Discursos leídos ante la Real Academia de Ciencias Exactas, Físicas y Naturales en la recepción pública del Sr. D. Santiago Ramón y Cajal el día 5 de Diciembre de 1897*, Madrid: Imprenta de L. Aguado, 27-49. <http://www.rac.es/ficheros/doc/00207.pdf>

Schroeder-Gudehus Brigitte 1990a. Nationalism and internationalism. En: RC Colby, GN Cantor, JRR Christie and MJS Hodge. *Companion to the History of Modern Science*. London and New York: Routledge, 909-919

Schroeder-Gudehus Brigitte 1990b. Internationale Wissenschaftsbeziehungen und auswärtige Kulturpolitik 1919-1933. Vom Boykott und Gegen-Boykott zu ihrer Wiederaufnahme. In Vierhaus, R. & vom Brocke, B. (eds.) *Forschung im Spannungsfeld von Politik und Gesellschaft*. Stuttgart: Deutsche Verlagsanstalt, 858-885.

Sherwood Bruce A. 1986. La lingva problemo en scienco kun emfazo de parolaj aspektoj. En: La lingva problemo en scienco kaj la rolo de la internacia lingvo. Esperanto-Dokumentoj 24E, UEA, Rotterdam 1986

Sokal Alan D. & Bricmont, Jean 1998. *Fashionable Nonsense: Postmodern Intellectuals' Abuse of Science*. New York: Picador Books (franca orig. 1997)

Tonkin Humphrey 2004. Lingva egaleco en internaciaj rilatoj. Liu Haitao, red. Lingvaj problemoj en internaciaj rilatoj / *Language Problems in International Relations*. Prelegaro por la Nitobe Simpozio. Pekino: UEA, 4-12 [anglalingva teksto (*Language Equality in International Relations*) 66-75; ĉinlingva teksto 134-139]

UNESCO 2000. *World Conference on Science. Science for the Twenty-first Century. A New Commitment*. Paris: UNESCO.

Vandenbroucke J. P. 1989. On not being born a native speaker of English. *British Medical Journal* 298: 1461 f.

Adreso de la aŭtoro

D-ro José Antonio VERGARA

Casilla 508

CL – Puerto Montt / ĈILIO

<joseantonio.vergara@gmail.com>

Priaŭtoro informo

La aŭtoro estas kuracisto, specialiĝinta pri publika sano kaj epidemiologio. Interesiĝas pri evolua biologio, historio kaj sociologio de la scienco, interlingvistiko, lingvaj ekologio kaj demokratio, daŭropova evoluigo.

¹ R&D (Research and Development), laŭ la kutima formulo enkondukita en 1977 far la angla historiisto de la scienco Derek de Solla Price (1922-1983)

² Komitato pri Internacia Helplingvo

³ Internacia Konsilantaro pri Esplorado, antaŭulo de la nuna International Council for Science (ICSU), do Internacia Konsilantaro por la Scienco.

⁴ kp. Manifesto de Prago 1996

⁵ American Association for the Advancement of Science

⁶ British Association for the Advancement of Science

⁷ Association française pour l'avancement des sciences

⁸ Australian and New Zealand Association for the Advancement of Science

⁹ Sociedade Brasileira para o Progresso da Ciência



Cifereca bildfarado – ĉu arto, scienco, teĥniko?

Rita RÖSSLER-BUCKEL

Jam de longe la cifereca prilaborado de bildoj kaj tekstoj fariĝis centra rimedo de la grafikaj laboroj en gazetoj, eldonejoj, televido, filmoj. La kapabloj de la unuopaj laborantoj etendiĝas en la vasta kampo de scienca ellaborado de programoj ĝis simpla premo de butono por certa efiko.



Bildo 1: Metamorfozo laŭ Peter Paul RUBENS
(Rita Rössler-Buckel, 1992)



Bildo 2: Davido travestiita

(Rita Rössler-Buckel, 2006)

Transformado laŭ *Michelangelo*
(unu el inter ĉ. 200)

Intertempe leviĝas ankaŭ la demando, ĉu elektronikaj rimedoj povas esti traktataj en la senco de arta bildfarado, ĉu la produktoj povas enteni artan kvaliton kiel ekzemple bone desegnita/pentrita pejzaĝo/portreto.

Mi volas prezenti la demandon laŭ personaj spertoj kun tiu ĉi rimedo: Mia unua komputilo (de ĉirkaŭ 1992) disponigis malgrandan pentroprogramon, kiu estis tre malrapida. Tamen mi foruzis multan tempon por ilustriti tutan libreton per preskaŭ tradicia pentromaniero, nur ne surpapere, sed ekrane. Mi metis ĉiun punkton per la komputila "muso", ĉiun streketon kvazaŭ per kraĵono, kun preskaŭ mandesegna rezulto. Nur la tiam neeviteblaj rektaj anguloj en rondaj linioj perfidis la aparaton komputilo.

La dua komputila generacio (de ĉirkaŭ 1998) unufoje estis ligita kun skanilo, kiu ebligis enigi de ekstere jam pretajn proprajn aŭ aliulajn desegnaĵojn, fotojn ktp. por prilaborado per la kunakirita desegna programo, ekz. alie kolorigi, multoblighi, kunmeti kaj tiel plu.

Aldone al la tria komputilo (de ĉirkaŭ 2004), mi aĉetis la unuan diĝitan kameraon, per kiu mi povis kolekti interesajn vidaĵojn, kiujn mi poste komputile disvolvis per nun jam tre taŭgaj kaj rapidaj programoj al tute aliaj aspektoj de pejzaĝoj, ĉiutaga vivo kaj artaĵoj. Sola manko povus esti la manko de palpebla aŭ strukture videbla surfaco de "nature" faritaj bildoj. Tamen en presa formo malaperas tiaj diferencoj.

Dum tiu ĉi dumjardeka evoluo la aparatoj kaj la teĥniko ĉiam pli fariĝis helpaj rimedoj de serioza artisma laboro, kiuj uziĝis kiel antaŭe la diversaj iloj de la multfaceta bildfara produktado.

Jes, la programoj multe kapablas, sed por elvoki konvinkajn rezultojn, ili ne sufiĉas solaj, ili ne el si mem liveras artajn produktojn. Gravaj estas la propra inventemo, la scio pri la helpiloj, la konscia vojo al la celo, la antaŭimago de la rezulto, la ĝenerala kreokapablo.

Ĉiuj tiuj kriterioj jam validis por la historie mane faritaj kreaĵoj. Esenca restas same en la nuna elektronika kampo stila gusto, forma konscio, artista fantazio kaj kapablo, kone kaj adekvate utiligi la teĥnikajn rimedojn.

Bildoj 3 – 6: La ESPERANTO-KASTELETO en Tavoleto (PU) / Italujo



(Rita Rössler-Buckel, 2006)



Tiam povas ekesti io, kion oni povus honori per la epiteto “arto“ (fakte en la tradicia senco). Tamen ankaŭ estonte arton ne kreas la aparatoj mem, sed ĉiam ankoraŭ la cerbo kaj la animo de la homo.

Apendico

Vd. Bildon 1:

Bildo kreita laŭ konvencia punktometa metodo, pikselon post pikselo, ankoraŭ nigra-blanka (1992); metamorfozo de pentraĵo fare de *Peter Paul RUBENS*, la majstro de la flandra barokpentrado, 1577 – 1640) por ilustraĵo de pri-Rubensa poemo (aperinta en la libro “*Licht zwischen Steinen / Lumo inter ŝtonoj*“ en Eldonejo “Ponto“).

En tiu ĉi tempospaco la komputilaj pentraj programoj ankoraŭ estis primitivaj. Tial oni povis desegni surekrane preskaŭ nur per meĥanikaj punktoj, linioj, ŝprucoj, koloraj kampoj kaj similaj. Tamen mi mem tiam aŭdacis desegni figurece elektronike kvazaŭ surpapere. Aliuloj kondukis pli “moderne“ kaj produktis simple kvadratojn kaj rondaĵojn...

Vd. Bildon 2:

Por la UK-kongreso en Florenco 2006 mi kreis virtualan ekspozicion kun multege da prilaboritaj versioj de la kongresemblemo, la Davido-skulptaĵo de *Michelangelo*. Kiam mi ofertis specimenon al la kongresa gazeto, la redaktoro tuj rifuzis, preskaŭ nevidinte la bildon, ĉar provokis lin la titolo “Davido travestiita“.

Jen evidentiĝis, ke eĉ en komuna lingvo diversaj konceptoj kaj kulturaj fonoj povas esti miskomprenoj: Ne ŝokis la bildo, ĉu cifereca aŭ ne, sed la vorto ‘travestio’, kiun mi komprenis tute neŭtrale “alivestado, variacio, transformado, metamorfozo“, sed kiu povis efiki – pro (laŭdire mis-)seksa konotacio – ofende al Florencanoj, adorantaj sian amatan Davidon.

Teknike mi moligis la Davidan konturon, forprenante de li la klasikan etoson, atribuante al li pli arĥaikan, pli sovaĝan karakteron. Kaj lia memprezenta ĉirkaŭaĵo nun ne plu estas la *Palazzo Vecchio* en la meza Florenco, sed libere inventita kontrasta strikta fono: sintezo de naturo kaj matematiko.

Vd. la kolorajn Bildojn 3 – 6:

Ne povas ekesti miskompreno pri la ciferecaj transformadoj de la fama “Esperanto-Kasteleto“ de la familio *Sachs*, sidejo de la Esperantaj sciencistoj en Tavoletto/Italio. La bildoj kreiĝis post la Jubilea Kunveno Tavoleta 2006-07-24/27.

Origine ĝi estis memfarita foto de la kasteleto kun ĝia tute propra viva kaj vigla etoso. Tia ĝi estis vere dokumenta, sed ne nepre estetike elformita foto. Por fari ĝin efemera esenco, mi ja estus povinta desegni ĝin surpapere je kerna reduktado. Sed, ĉar aktuale logis min la esplorado de la eblecoj de la elektronika medio, mi ne prenis kraĵojn kaj farbotubojn, sed utiligis la komputilon.

Unue per specifaj programoj mi forprenis la aktualan, dokumentan karakteron per nuligo de superfluaĵoj kaj negravaj detaloj, tiel kreante pli abstraktan grafikan formon. Poste mi elektis novajn kolorojn, intence ne nepre naturecajn, por kolorigi la diversajn bildpartojn, indikis la lumdirekton, transformis la surfacon. Mia muzikista variemo gvidis al tuta serio da tiaj transformadoj, el kiuj mi tie ĉi elektis kvar.

Cetere, oni povus daŭrigi la variigadon preskaŭ senfine – bone kongrue kun la prelegotemo de mia edzo en la Jubilea Semajno en la indikita Esperanto-Kasteleto en la jaro 2006: “Senfinco en la arto“.

Adreso de la aŭtorino

Rita RÖSSLER-BUCKEL
Am Mönchsbusch 6
DE – 67373 Dudenhofen
GERMANIO

<rozsas@web.de>

Priaŭtora informo

Apud la profesia laboro (unue kiel flegistino kaj gvidantino de malsanuleja departemento, poste kiel muzikinstruistino kaj docento ĉe Distrikta Muziklernejo) la aŭtorino evoluigis siajn artajn kapablojn. Ŝi desegnas, pentras, utiligas nuntempajn elektronikajn rimedojn. Pli ol cent naciaj kaj internaciaj ekspozicioj agnoskas ŝian verkadon.